



8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73 Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Telefone 42-9090
70.000 – Brasília (DF)

Nº 21

DEZEMBRO DE 1976

BOLETIM INFORMATIVO

PACON SUR LA TERO !

Alvenis denove la plej signifa festo de la kristanoj, la naskiĝdato de nia Savanto, la Kristnasko.

Sur la Tero inter multegaj amaraj kaj malĝojaj okazaĵoj ekfloras denove la espero en la koroj de suferantaj popoloj, revantaj pri paco kaj amo.

Por la esperantistoj la monato decembro estas festa, ĉar la 15-an ni memoras la naskiĝtagon de D-ro L.L. Zamenhof, la kreinto de la Internacia Lingvo. Li estas vere paca apostolo. Li ne nur diris tion, sed agis efike kreinte la ĝis nun plej perfektan komunikilon Esperanto.

Sur la Tero montiĝas la ve – ! – oj. La mondo dronas en malfeliĉon pro militoj, elementaj katastrofoj kaj malamo.

Se la Homaro komprenus unuj la aliajn, se inter la diversaj nacioj vekigus amo kaj komprenemo, la tuta mondo povus vivi paco sen la amaraj ve – ! – oj. Estis la celo de nia Majstro pacon kaj amon disdoni.

Li naskiĝis en decembro, eble por iĝi heroldo de la Bono kaj Paco, kuriero de nia Savanto.

Ni, lia sekvantaro estu ĉie kiel diskonigantoj de lia mesaĝo. Kontaktu ni niajn samideanojn, montrante harmonian fratecon al ĉiuj personoj konataj aŭ nekonataj. Elmontru ni esperantistoj. ke

ni estas gefratoj, geamikoj, kiuj amas unuj la aliajn. Prenu ni amike la manojn unuj de la aliaj, elmontrante reciproke amikecon.

Tio estas la maniero trovi la certan vojon por neperei en mallumo !

La brilanta stelo sur la horizonto estu nia gvidanto kiel iam estis la gvidanto de la tri magaj reĝoj.

Pacan, feliĉan Kristnaskon kaj prosperan Novjaron deziras al niaj karaj gesamideanoj la direktoraro de Brazila Konsilantaro de Esperanto

☆☆☆☆☆☆

Atentu!

Nia Informa Bulteno aperos ĉe la fino de februaro 1977-a. Ĝis tiam !

La Redakcio.

☆☆☆☆☆☆

BIOGRAFIO

Nia vicprezidanto JOSÉ PASSINI naskiĝis en Itapirema, ŝtato San-Paŭlo. Nuntempe li loĝas en Juiz de Fóra (MG).

Li estas profesoro pri lingvoj en la Universitato de tiu urbo.

Samideano Passini lernis Esperanton en la sama urbo, en la jaro 1962-a vizitante la kurson gviditan de S-ino Mercedes Rodrigues Braga kaj per korespondado li faris la superan kurson de Brazila Esperanto—Ligo.

Li fondis la grupon Esperanto en

tiu ĉarma urbo, estante nun ĝia prezidanto.

En la urbo Santos Dumont (MG) ii instruis Esperanton kaj fondis grupon.

Lia plej grava kaj sukcesa laboro estas la enkonduko de la Internacia Lingvo kiel oficiala lernobjekto en la Beleta Fakultato de la Universitato de Juiz de Fôra.

La peto pri enkonduko estis subskribita de pli ol 600 gelernantoj de tiu lernejo. Esperanto egalvaloras al la fremdaj lingvoj instruataj en tiu Universitato.

Li apartenas al kadro de la vicprezidantoj de BKE por "Lingvistiko".

Lia ĉarma edzino, s-ino Norma Passini ankaŭ scipovas Esperanton, helpante la edzon en lia klopodado.

S — ano Passini estas unu el la nuntempaj fortaj kolonoj de la Esperanto-Movado en Brazilo. Ni ne forgesu la vortojn de Zamenhof: "Obstine antaŭen, la nepoj vin benos se vi pacience eltenos!".

☆☆☆☆☆☆

NI SCIIGAS...

SAN — PAŬLO (SP) — Kiel kutime ĉiam aktivas bone nia vicprezidentino Elvira Fontes, kunlaborante ĉe "Diario Popular", disvastigante la Internacian Lingvon.

☆☆☆☆☆☆

Nia redakcio kun plezuro ricevis leteron de samideanino Fanny Dupré, sendante al ni kopion de la verko de ŝi, premiita en São João da Boa Vista (SP) en konkurso titolita "Lazaro Zamenhof":

☆☆☆☆☆☆

MIAJ HAJKOJ

PRINTEMPA

Floras la naturo.
Feliĉaj, birdetoj kantas.
Gojas mia koro.

SOMERA

Hela oriento.
Brilanta, ruĝa, leviĝas
La varmega suno.

MARA

Sur la verda maro,
Blanka ŝip' navigacias,
Portante mil revojn.

Mi triste rigardas
La senfinon de la maro,
Kien iras vi?

VINTRA

I

Mateno malvarma.
Floroj mortaj sur la kampo,
Neniam revenos.

II

Blanka neĝo falas.
Mi vidas tra la fenestro
Frostigitan lagon.

III

Dormas la infano.
Trista kaj malvarma nokto.
Ho! La povra lito

Ni gratulas nian samideaninon Dupré, kiu gajnis la unuan premion ĉe la unua literatura konkurso en São João da Boa Vista, dank'al klopodo de nia vicprezidanto D-ro Jatir Gonçalves Vieira, kiu ebligis la aperon de laboro de la kapabla kaj talenta Samideanino Fanny Dupré.

Ŝiaj mildaj versoj estis ĝis nun kaŝitaj kiel perloj en profunda maro.

Ni esperas, ke nia esperanta poetino konkeru multajn unuajn premiojn en estontaj konkursoj.

GEEDZIĜO EN SAN-PAŬLO

Kun plezuro ni sciigas, ke niaj kare-

gaj gesamideanoj Waldir Lisboa Rocha kaj Dalva geedziĝis en la 6—a de novembro lasta.

Samideano Waldir estas nia vicprezidanto pri dentistarto. Ni kore gratulas al novgeedzoj dezirante ĉiajn feliĉojn al ili ambaŭ.

☆☆☆☆☆☆

SANTOS (SP) — Kiel ni jam sciigis la XII-a Seminario de Esperanto okazos en la mondfama havenurbo Santos, de la 14—a ĝis la 18—a de julio, 1977.

Ni petas apogon al ĉiuj niaj gesamideanoj, sciigante en naciaj gazetoj la samideanaron pri la okazaĵo. La aliĝojn faros la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro-Pôst-kesto N^o 1887-ZC 00.

☆☆☆

S. Borromaus

FIŜO — FUŜE

Li aĉetis karpon, metis ĝin en la naĝbacenon de sia ĝardeno kaj alverŝis kilogramon da salo. Ridinde estus ja supozi, pensis s-ro Kalomir, ke la karpoj ne povus vivi en sala akvo.

La postan tagon s-ro Kalomir alverŝis duan salpakajeton. La postmorgaŭan trian. Kaj tiel li pluis dum la tuta semajno— ĝis la akvo en la naĝbaceno estis nete salsaturita. Kaj nun okazis la nekredebla, la karmo malgraŭ tio ĉirkaŭnaĝis plejvige.

La amatora esploristo, s-ro Kalomir, senhezite sidiĝis kaj ekskribis traktaĵon pri tiu eksperimento kaj— sendis ĝin al scienca Instituto. Ne daŭris longe, atingis lin komuniko: La Instituto rekomendis al li konsulti kuraciston.

Tio iom vundis la vanteman koron de la amatoro Kalomir. Sed lia esploremo tamen ne ŝrumpis. Nun li elprenis la karpon el la malseka elemento kaj metis sur la razenon apud la baceno. Unue dum kvin minutoj, poste dek, sekvis dudek minutoj, fine duonhoro, kaj poste eĉ dum tuta horo. Ridinde estus ja supozi, pensis s-ro Kalomir, ke la karpoj povus vivi nur en akvo kaj ne en la seka elemento.

La fiŝo akomodigis al la nova me-

dio. Sed la plej surpriza venis, kiam post du semajnoj ĝi eltenis ekstere eĉ kelkajn horojn. Post ses semajnoj ĝi jam ne emis reiri al sia naĝbaceno, sed preferis salteti inter la ĝardenaj floroj kaj arbetoj. La karmo prenis nur de tempo al tempo pluvduŝon ĉe la razena aspergilo. Por refreŝigi.

Plena je entuziasmo s-ro Kalomir skribis novan traktaĵon kaj sendis ĝin refoje al la scienca Instituto. Vane. Responde li ricevis minacleteron kun averto estontece ne ĝeni plu la Instituton per traktaĵoj.

La tempo pasis. Antaŭ nelonge sendis leteron al s-ro Kalomir la ĉefo de la Instituto persone. Li pardonpetis.

Ĉar similajn eksperimentojn entreprenis ankaŭ plej altrangaj fakuloj, tial al la Instituto, liaj esploroj jam ne aperas en la lumo de neracio. Oni petas kompleze s-ron Kalomir alsendi la akomoditan fiŝon por sciencaj esploroj, kion faros komisiono el tre aŭtoritataj profesoroj.

Num venis la momento, pensis s-ro Kalomir, por reciproki al tiuj sinjoroj, por rifuze fingroplekti al ili figon. Li skribis: Mi tre bedaŭras, ke mi ne povas plenumi al via deziro. Antaŭ nelonge, promenante en la ĝardeno, la karmo akcidente falis en la naĝbacenon. Kaj dronis. Ĉiuj klopodoj por revivigi ĝin restis bedaurinde senefikaj.

El la germana: trad. D. Wranka

☆☆☆☆☆☆

SÃO BERNARDO DO CAMPO (SP) — Nia vicprezidanto Majoro Gilberto A. Silva Velho, ricevis kaj transdonis al ni la informon pri la nomumo de iu strato en ĉi tiu urbo laŭ leĝo proponita de la urbkonsilanto Alvaro Domingues kun la titolo "Rua Lázaro Luiz Zamenhof".

Lia propono ricevis la numeron 723/76, ĝin subskribis kune kun li la kolegoj Sergio Lorenzoni kaj Leonildo Freitas Magdalena.

La propono fariĝis leĝo sub n^o 5221/76, de la 1—a de septembro 1976, tuj sankciita de la urbestro, D-ro Geraldo Faria Rodrigues.

Oni ŝuldas tiun okazintaĵon al la la-

boro de Silva Velho ĉe la direktoro de "Correio Fraterno do ABC" lia persona amiko, kiu siavice pritraktis la aferon. Gratulon !

CAÇAPAVA (SP) — Nia senlaca kunlaboranto Silva Velho informas, ke li senĉese klopodas realigi utilan laboron. Li estas prezidanto de la loka sinfonia orkestro "Vale do Paraíba", kiu ofte aktivas.

Krom tio nia vicprezodanto kunordigas en Caçapava la grupon de skoltaj. Ĝi konsistas el 39 elementoj. Kelkaj, de 7 ĝis 10 jaraĝaj infanoj. Estas antaŭviditaj 60 estontaj esperantistoj, ĉar oni intencas instrui al ili la Internacian Lingvon.

La skoltaj kun 7/10 jaroj estas "lobinhos".

GAZETOJ RICEVITAJ — Akurate ni ricevas kaj dankas la jenajn informilojn: "Jornal do Vale", "O Taubateano", "Matutino Popular", el Caçapava kaj Taubaté; "Correio Fraterno do ABC", el São Bernardo do Campo, "Viver Bahia", (Salvador), kaj "Traço de União" (Paraná), "A Candeia", el Brazilio (FD) kaj "La Aglo", el Gojânjo.

SANTOS (SP) — Nia prezidanto F. S. Almada akurate verkas artikolojn rilatajn al disvastigo de Esperanto, publikigante ilin en la grava gazeto "A TRIBUNA" de nia urbo.

JUIZ DE FÓRA (MG) — La revuo "Lince", grava informilo de Juiz de Fóra, intervjuis nian prezidanton kaj la Profesoron José Passini en la pasinta monato pri la Lingvo Internacia, kaj aperigos sciigojn abundajn pri la neŭtrala komunikilo kaj pri ĝia valoro por la interrilatoj de la popoloj. Ĝia eldono havas pli ol 5000 ekzemplerojn.

MARILIA (SP) — Nia vicprezidanto Wilson Ferreira Martins klopodas nuntempe enkonduki Esperanton en tri fakultatojn de la regiono Marília, t.e., Assis, Bauru kaj Marília mem. Laŭŝajne lia laboro estos efika ĉar li kontaktas la plej altgradajn

aŭtoritatulojn, ĉu regionajn, ĉu en la ĉefurbo de la ŝtato.

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

BRAZILIO (FD) — Nosso vive-presidente, Comandante Euripedes do Nascimento, publicou no órgão oficial da FREL, a "Candeia", nº 83 último, interessante artigo, como que sugerindo a criação de uma Federação Brasileira de Esperanto com o fim de unificar o movimento esperantista brasileiro, ora dividido entre três organizações, e, como disse o articulista, sem comando, "sem cabeça".

Ora, os nossos estatutos são bem claros: o CBE (Conselho Brasileiro de Esperanto) foi criado justamente para procurar unificar o movimento esperantista Brasileiro, mas não com a intenção de dirigi-lo ou de interferir nas organizações que o compõem, PORÉM com a intenção de vê-las unidas em torno da sua direção, coparticipando da mesma, procurando na união a força necessária para o progresso do movimento.

De início 16 organizações se inscreveram com tal finalidade, criaram o CBE e elegeram sua primeira diretoria, depois de aprovar seus estatutos.

Muitas entidades foram convidadas a tomarem parte na nova organização, inclusive a Liga Brasileira de Esperanto e a Cooperativa Cultural dos Esperantistas. A Liga recusou alegando falta de autorização de seus estatutos e a Cooperativa sem alegar motivo. Contudo, esta última, tendo seu presidente aceito a vice-presidência do Conselho, praticamente colaborará com a nova organização e dela receberá, por sua vez, a ajuda de que precisar.

As entidades criadoras do Conselho, aprovaram seus estatutos, elegeram sua primeira diretoria, e, como não poderia deixar de ser, seus diretores são membros dessas fundadoras: F. S. Almada, presidente do C. B. E. é presidente do Centro Esperantista de Santos; Elvira Fontes, vice-presidente executiva, é presidente da

Associação Paulista de Esperanto; Nelson Pereira de Souza, secretário geral, era diretor da Associação Brasileira de Esperanto; e Carlos Augusto Siqueira da Cunha, seu diretor financeiro, é secretário licenciado do Centro Esperantista de Santos.

Além disso, 50 vice-presidentes para finalidades diversas, que prestam relevantes serviços ao Conselho são elementos de diretorias de muitas outras entidades do Brasil.

Assim sendo, torna-se absolutamente inviável e desnecessária a criação de tal Federação

O de que se precisa, sem demora, é do reconhecimento por parte de nossos esperantistas de existência do órgão que está a seu dispor em Brasília, já em elevado grau de entrosamento com as autoridades federais, principalmente com o Ministério da Educação e Cultura, a fim de tudo obter para o bem de nossa causa.

Quando se imaginou em Valença a realização de um congresso universal de Esperanto no Brasil, anseio de quantos participaram do Seminário ali ocorrido, escrevemos à UEA enviando artigo com informação de Brasília, lugar então escolhido para o certame. Em resposta o sr. Sadler, diretor daquele órgão internacional, dirigiu à Cooperativa, enviando cópia para a Liga e para o CBE, informando as formalidades exigidas para a consecução de tal evento, citando como causa primordial a união dos brasileiros, entre outras exigências, pois que há muita responsabilidade em tais congressos.

No Seminário de Brasília ocorrido este ano, mesmo sem a participação da Liga, a Cooperativa, coadjuvada pelo Conselho, pleiteou a realização de um congresso universal no Brasil, o que foi aceito, para o ano de 1981. Isto porque, acreditamos, duas entidades estavam subscrevendo o apelo.

O Conselho não é propriamente uma organização composta de associados individuais, mas de entidades-associadas, unidas, com o fim de facilitar de toda for-

ma o movimento esperantista no território nacional, mantendo as melhores relações possíveis com a Associação Universal de Esperanto, bem como com todas as demais, dos diversos povos do mundo.

-----xxxxxxxx-----

MENSAGEM DE ESPERANÇA

Que "o Esperanto é a Esperança"
Já o disse alguém com razão:
Pois falando é que se alcança
As metas no coração !..

Seja, pois, ô meu amigo,
O Novo Ano, na verdade,
Bem camarada contigo,
De Paz e Prosperidade !

Muita saúde e alegria
Junto aos seus familiares
Que haja luz e harmonia
E Paz em todos os lares !..

E para que, em qualquer canto,
Não sejamos como mudos,
Haja, também, o Esperanto
Em nosso plano de estudos !

Manoel Borges

MONO RICEVITA

Kun granda ĝojo ni kore dankas la jenajn donacojn:

Dr. Modesto de Abreu	Cr\$ 400,00
A.A. Antunes Jor	Cr\$ 50,00
Maria Almada	Cr\$ 100,00
Luiz T. Silva	Cr\$ 50,00
Dr. Walter Francini	Cr\$ 100,00
Anna Maria T. Munen	Cr\$ 150,00
Manoel Borges dos Santos . .	Cr\$ 100,00
Sumo	Cr\$ 950,00

GOJANJO (GO)

Kun plezuro ni legis en "Aglo", informilo de la Gojanja Esperanto-Instituto, ke niaj gesamideanoj starigis "Sparlibreton" (Caderneta de Poupança) por akiri monsumon, ĉar ili intencas partopreni la XII-an Seminarion de Esperanto, okazon en Santos. de la 14-a ĝis la 18-a de julio, 1977.

Ni kore gratulas niajn praktikajn gesamideanojn, kiuj agante tiel faciligas al si la vojaĝon.

Kiuj pretas imiti ilin?

ZAMENHOFA TAGO

Ni kore dankas la inviton por ĉeesti la festotagon de nia Mjastro okazontan en decembro la 15-an en Gojania.

Gratulante niajn gesamideanojn ni kore deziras al ili plenan sukceson.

☆☆☆☆☆☆

SAN-PAŬLO (SP)

San-Paŭlo Esperanto-Asocio sendis al ni afablan inviton por partopreni la omaĝojn okazontajn en la tago 12-a al nia Majstro Zamenhof je la 16-a horo, kio okazos en la Placo Respubliko kie troviĝas la busto de la omaĝoto. En la tago 15-a okazos la fermo de la "Esperantiado" en la aŭditorio de SESC — Rua Dr. Vila Nova, 228 je la 20-a horo, kiam okazos ankaŭ la lanĉon de la stampilo rilata al "Tago de la Internacia Lingvo Esperanto".

Finfine estos la interŝanĝoj de donacoj ĉe la "Sekretaj Amikoj".

☆☆☆☆☆☆

SALVADOR (BA)

Nia Vicprezidanto José Saraiva Matos informis nin ke la junularo sin preparas por grupe partopreni la XII-an Seminarion en Santos. Amike ni atendos ilin.

☆☆☆☆☆☆

ESPERANTO-ALDONO

La ekzemplero de Oktobro pasinta N^o 111 aperigis tre interesan artikolon de nia simpatianto Augusto Marques de Freitas finiĝinta per la jena poeziaĵo de la unua profesoro de nia prezidanto ABEL GOMES:

Estreitar os povos,
Semear a compreensão.
Preparar a concórdia,
Espalhar a solidariedade humana,
Reunir as criaturas,
Aclarar o caminho das nações,
Nutrir os ideais de fraternidade universal,
Traçar rumos novos à evolução da Terra,
Organizar a Paz do terceiro milênio.

☆☆☆☆☆☆☆☆

En la sama gazeto niaj vicprezidantoj D-ro Modesto Belmonte de Abreu, Delio Pereira de Souza, Majoro Gilberto da Silva Velho kaj Oto Vaske kunlaboras kun bonegaj artikoloj pri la Esperanto-Movado.

☆☆☆☆☆☆☆☆

NI KONDOLENCAS

Nia vicprezidanto Dirceu Porciuncula sciigis nin pri la forpaso de nia samideano Nelson Rodrigues Nunes, unua kassisto de la Esperantista Societo de Rio Grande (RS).

Ni sincere Kondolencas la Familion de la forpasinto.

☆☆☆☆☆☆☆☆

Atual Diretoria da Associação Bahiana Esperanto:

Pres.: Eng. Isao Noguti
Vice-pres.: Dr. José Siquara da Rocha
Ass.da pres.: Prof. Vivaldina de M. Caymmi
1^o Secr.: Prof. Tânia Márcia Silva Barros
2^o Secr.: Leila Maria Santos Pereira
1^o Tes.: José Adson de Almeida
2^o Tes.: Maximino Alfaya Bugarin
Bibliotecário: Cap. Godofredo de A. Goes
2^o Bibl.: Eduardo Carrichio

Existem ainda outros Departamentos: de Cursos, Divulgação e Cultura, Feminino e de Jovens.

Conselho Fiscal: Edson Guimarães Pedra, Hermes de Deus Pitta, Dr. Jaddo Couto Maciel, Onias Almeida, Leopoldo Knoedt.

NI EGOISME AĈETU LIBROJN

Walter Francini

La literaturo en Esperanto kreskas konstante. Ĉiu numero de la revuo "Esperanto" prezentas la lastajn novaĵojn en la eldona kampo. Kelkfoje temas pri imponaj verkoj, kiuj restas kiel mejloŝtonoj en la literaturo de la internacia lingvo, ekzemple: "Esperanto en Perspektivo". Kompreneble, kiel ĉe la nacilingvaj literaturoj, temas plejofte pri verkoj ne tiel gravaj, tamen indaj je legado pro multaj kialoj.

Homoj ne emas doni kaj ricevi kompanse nenion. Do estus vane skribi tie ĉi ke oni aĉetu esperantajn librojn nur por helpi la disvastigon de niaj lingvo kaj kulturo. Tial ni analizu la ĉefajn avantaĝojn de konstanta legado de esperantaj verkoj.

Unue mi kredas ke tio altigas la ĝeneralan kulturon. Mi persone havis "ŝuldon" al monda ĉefverko: "La Dia Komedio". Mi klarigas ke mi estas brazilano, italdevena, kaj studis ĉe mezlernejo nomata ĝuste "Dante Alighieri", la aŭtoro de tiu poemo. Dum la lernejaj jaroj mi legis kelkajn malgrandajn pecojn de tiu ĉefverko, tamen poste mi neniam kuraĝis legi ĝin komplete. La oportuno alvenis ĉe la apero de la eldono dulingva: itala kaj esperanta. Ne nur mi legis la esperantan tradukon sed ankaŭ, helpate de ĝi, la italan originalon, kiu estas malfacila ankaŭ por tiuj, kiel mi, kiuj posedas la italan lingvon, ĉar temas pri ĝia formo plej malnova, el la 14-a jarcento.

Alia avantaĝo estas ke la literaturo en Esperanto permesas koni ĉefverkojn kies nacilingvaj tradukoj malfacile troveblas. En Brazilo mi konas ekzemple neniun portugalan tradukon de la hungara poeto Sándor Petofi. Mi ĵus legis lian "Libero kaj amo", en traduko de Kalocsay, kaj tiel mi povis ĝui la arton de la elstara kreinto de "Johano la Brava". Tio estas granda servo: Esperanto kiel ponto por la kono de aliaj kulturoj. Mi substrekas ke tio estas profesie grava por mi, ĉar mi instruas lingvon kaj literaturon. Kompreneble alispecaj profesiuloj trovas ankaŭ taŭgajn librojn por siaj fakoj.

La riĉiĝo de la lingvaj konoj estas alia avantaĝo ne malŝatinda. "Fundamenta Krestomatio" estas sendube baza libro por esperantisto, tamen por multaj ĝi restas ankaŭ la sola legita verko. Ĉu tio estas korekta se oni konsideras ke ĝi aperis en 1903 kaj de tiam la lingvo multe kreskis?

Tamen mi kredas ke la elstara avantaĝo de la literaturo en Esperanto estas komerca, ĉar ĝi povas signifi la plej grandan fonton de enspezoj por esperanta klubo. Tio okazis ĉe San-Paŭlo Esperanto-Asocio dum longa tempo, ĝis ĝi decidis starigi apartan librovendejon en alia loko. Libro vendiĝas se la klubanoj havas okazon vidi ilin sur stando. La kluboj kiuj ankoraŭ ne havas libroservon faru sperton: aĉetu malgrandan stokon da libroj kaj ilin elmontru. Ili malaperos rapide. . .

Jen du gravaj adresoj por mendoj de libroj: en Nederlando, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002; en Brazilo, San-Paŭlo Esperanto-Asocio, Avenida Senador Queirós, 279, conjuntos 50/58, caixa postal 5888, CEP 01000, São Paulo, SP, kaj Livraria e Papelaria Esperanto, Rua Líbero Badaró, 646, loja 3, CEP 01008, São Paulo (SP).

Aĉeti kaj legi librojn en Esperanto estas sendube grava kontribuaĵo por la movado, sed multe pli grava avantaĝo por niaj personaj kulturo kaj gusto.

JUNULARA ANGULO

Kiel ni jam informis BEJO (Brazila Esperanta Junulara Organizo) eklaboras serioze. Ĝia bulteno informas nin prila fortostreĉo de niaj gejunuloj por esti utilaj al Esperanto-Movado.

Ĝojigas nin la fakto, ke ili translokiĝas BEJO'n al Brazilio. Por entuziasma junularo tauĝas la nova kulturcentro Brazilio.

La kultura direktoro de BEJO, s-ano André Luiz Fausto de Souza gvidas Esperanto-kurson en Niteroi.

Li estas konata pianisto, sde la sankta meso en Brazilio li partoprenis la koruson de kantistoj ankaŭ.

En tiu okazo li klarigis: "Mi ne estas kantisto, mi estas pianisto".

Tamen en nia movado ĉiu faras ĉion, jen kial nia samideano krom instruisto fariĝis pianisto kaj kantisto.

Li organizos muzikfeston por la XII-a Seminario en Santos. Lian perlaboron li utiligos por partopreni kaj aktivi en la Seminario.

☆☆☆☆☆☆

ALVOKO!

Por la proksima Seminario BEJO per sia kultura departemento intencas fari muzikfeston, presentante nekonatajn muzikojn kaj poeziaĵojn.

Kiu deziras partopreni ĝin por ricevi la regularon, bonvolu sin direkti al André Luiz Fausto de Souza, Rua Paulo Alves, 110 — Bloco E — apt. 503 — Ingá — 24.000 — Niteroi (RJ).

La Sporta Departamento pere de Alexandre Fausto de Souza informas, ke NEJO (Niteroi Esperanto Junulara Organizo) kreis sian grupon de "Voley", "Ping-Pong" kaj "Futbol-de-Salão". Agu same. Li atendas vian leteron, laŭ la sama adreso de André Luiz.

Gejunuloj kunlaboru!

☆☆☆☆☆☆

ANTAŬEN!

Maria Almada

Junulara grupo,
kunligita forto,
nur al unueco
favoras la sorto.

Varbu novajn anojn
al la verda rondon,
verajn pacamantojn
por la tuta mondo.

Estas via devo
neĉesi labori:
la verdan standardon
defendi kaj ori.

Ĉiu juna koro
sentos vian vokon!
ne timu la homan
malfidon kaj mokon!

Estas vi estonto,
la forto valora,
kiun Esperanto
deziras fervora.

Via bonekzemplo
Disvastigu ĉie!
Tre kuraĝe marŝu!
Plie! Plie! Plie!